

## & Al la memoro de grafo W. T. Stead:

< Rekante 64 el 103 battoj por strofo, entute 515 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Aŭtunaj floroj, The British Esperantist, 1912) kun moto "Nearer my God to thee...". Baladigis Martin Strid (2016) per sveda polsa melodio baladigita kaj nova rekantaĵo. Klarigojn (\*) vidu post la strofoj.>

### (#Melodio:

(/SoSo dodo mire TiTi refa mire; dodo mi mi sofa rere TiLa So; SoSo dodo mire TiTi refa mire; dodo mi mi sofa rere TiLa So; lala fado fala soso mido miso; fafa re Ti SoTi doTi domi soso;

(#Rekantaĵe: lala fado fala soso mido miso; fafa re Ti SoTi do do; SoSo dodo mire TiTi refa mire; dodo mi mi sofa rere TiLa So; SoSo dodo mire TiTi refa mire; dodo mi mi sofa rere TiLa So; lala fado fala soso miidodo miso; fafa re Ti SoTi doTi domi so; lala fado fala soso mido miso; fafa re Ti SoTi do do o)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 /Tutan mondon skuas unu granda ĝemo ; de la oriento ĝis la okcident', ; plej funebra sonas ĉie rekviemo ; kaj la korojn premas unu sola sent' ; pro vi, kiuj laŭ mistera dia plano ; kuŝas en la profundaĵ' de l' oceano\*.

(×: **William Thomas, prezidanto vin invitis\*** ; por paroli pri la paco ; kaj vi ne komprenis ke vi jam incitis ; la bankestrojn per klarvida la sagac' ; ĉar la monopolon monan\* vi tro spitis ; kaj fariĝis kontraŭ ŝtelo nun minac' ; Morgan\*, kial vi malmendis vian bileton ; unu tagon antaŭ ŝipa ekvetur'? ; En vagono de sinjoro Aldrich\* gastis ; vi por banka truko nur.)

'2 La plej granda, nobla verko de l' homaro ; kun vi ekbatalis, granda, ho, natur', ; kun vi de sekretoj plena, vasta maro, ; kun vi stranga elemento sen mezur'! ; Tamen, ve, ne estas homa fort' sen limoj, ; kaj sur fundon maran falas la viktimoj. ....

'3 Unu kunpuŝiĝo kaj... finiĝas ĉio! ; Mastoj tuj falegas, ; staras la radar', ; kaj la koron disŝiranta plor' kaj krio ; disvastiĝas en mallumo sur la mar'. ; Homa verko ŝanceliĝas kiel ŝelo ; kaj en ondoj dronas ankaŭ Verda Stelo. ....

'4 Ho, al multa hom' enhor' terura, sorta ; lasta rifuĝejo estas vi, Esper', ; antaŭ ol lin mara ondo, ŝaŭma, forta; portis for en strangan mondon sen mizer'. ; Ho, Espero, via plej favora ano ; ankaŭ dormas nun sur fund' de l' oceano. ....

'5 Kaj la maro ree ondojn siajn rulas ; sur profunda tomb' sen krucoj kaj sen nom', ; frosta vent' de nord' per sia kanto lulas ; ilin en plej nobla tombo de la hom' ; "En nemezureble, nekonata spaco, ; dormu, dolĉe dormu en eterna paco." .....

### < Klarigoj pri Al la memoro de grafo W. T. Stead:

'1 La ŝipo Titanic survoje de Southhampton en Anglujo al Novjorko en Usono aprile en 1912 kun 1500 homoj pereis en Norda Atlantika Maro. ; La plej fama pasaĝero pereanta kun Titanic estis William Thomas Stead ("Ŭiljem Tomes Sted"), ĵurnalisto pionira kaj fondinto de Londona Esperanto-Klubo kaj de Brita Esperanto-Asocio. Li survojis al Carnegie Hall, kien usona prezidanto Taft invitis lin paroli en kongreso pri paco. ; J. P. Morgan, usona bankisto kaj posedanto de kaj Titanic kaj ĝia "fratinŝipo" Olympic, estis veturonta samvojaĝe sed en la tago antaŭ la foriro de Anglujo malmendis sian bileton. ; Nelson W. Aldrich, usona senatano, novembre en 1910 sekrete kunigis kvin bankistojn, inter ili tri anoj de J. P. Morgan, veture en fervoja vagono al privata klubejo en Jekyll-insulo, por ellabori leĝon pri monopollo de privata banka kartelo, "Federal Reserve Act", kiun akceptis la usona kongreso en 1913. Tiun leĝon kontraŭis krom W. T. Stead la bankistoj John Jacob Astor, Benjamin Guggenheim kaj Isa Strauss, kiuj ankaŭ pereis kun Titanic.>